



2(164)
2017

Apudvistula Bulteno

de Krakova Societo ESPERANTO

Bultenon redaktas: ĉiuj anoj de Krakova Societo ESPERANTO,
Adreso por korespondi: str. Sokolska 13, 31-515 KRAKÓW

Jan Leończuk

do Flamandczyka który na złotej tacy
czułym pędzlem położył trzy jabłka
i ciemność przyczajoną w tle

piszę te słowa

choć nie dochodzi już szept
ani poruszenie niecierpliwych warg
była zapewne jesień
i ptaki szykowały się do odlotu
ozłocone jabłka milczały
i jesień delikatnie ocierała się o naskórek
zdejmując czule zapach
zmieszany z wonią starego sadu
i zmęczonego lata

mistrzu twoja rzezana patera
nadal figluje ze słońcem
odślaniając ścieżki znaczone rylcem
na których lato pogubiło
niewiedzące płatki snu

i wtedy Flamandczyku
owoce przynoszą szept Edenu

w bzach zaplątana młodość
słowiczym trelem budzi każdą noc

a wówczas księżyc przysiada
na wiejskiej ławeczce
niczym strudzony wędrowiec
spragniony czulej rozmowy

al la flamando kiu sur la oran pleton
per sentema paniko metis tri pomojn
kaj malhelon embuskantan en la fono

mi skribas ĉi vortojn

kvankam ne proksimiĝadis jam flustro
kaj ekmovi de malpaciencaj lipoj
estis certe aŭtuno
kaj birdoj preparis sin por forflugi
orumitaj pomoj mutis
kaj aŭtuno delikate frotiĝis je epidermo
deprenante kortuŝe odoron
miksitan kun aromo de malnova horto
kaj laciĝinta somero

majstro via skulptita telero
plu Petelas kun la suno
malkovrante padetojn signitajn per ĉizilo
sur kiuj somero perdis
nevelkantajn petalojn de dormo

kaj tiam la flamando
la fruktoj alportas flustron de Edeno

en siringojn implikita juneco
per la najtingala trilo vekas ĉiun nokton

kaj tiam la luno eksidas
sur la vilaĝan benketon
kvazaŭ laciĝinta vaganto
soifanta la senteman interparolon

tradukis Lidia Ligęza

24-an de decembro de la jaro 2006

Kaj ĝi rompiĝis en miaj polmoj verŝajne ordinare, brue kaj solene. Mi rigardis reciproke en niajn okulojn kvazaŭ en ili intencis aperi vojo al Betleĥemo. Sed la vojo ne estis, la plikita per malhelo ĉielo peze pendis super la kapoj. Flagris lumetoj, sed estis en ili multe da nervigitaj tremoj, ja ili estingiĝis kaj denove bruliĝis kvazaŭ malfacile al ili estus decidi solene, feste daŭri. Nur odoroj de manĝaĵoj surtabligitaj rememorigis ian strangan vespermanĝon. Blanka tablotuko, bruligitaj kandeloj – plenigis nian hejmon per io neordinara. Ĝi ne estis vespermanĝo, kiun ĉiutage oni konsumis. La interparoloj estis ankaŭ aliaj. Kaj ja en la ĉebrusto atendis sian tempon kantikoj kaj pastoraloj. Ĝojaj kaj frivoletaj, kvazaŭ en la sankta nokto, ĉi unusola nokto, ili serĉis perditajn homajn ĝojojn por restitui al homoj ekvilibron de la spirito kaj por iliaj koroj ankoraŭfoje plenigu per la espero. Kanto, ankoraŭ ne disflorita, plenigis enon de la hejmo per neĉiutaga de unueco. Kiel instrumentoj de la simfonia orkestro, akordiĝis niaj koroj. Ĉi tiu stato de la ena ŝanĝiĝo restos la plej profunda sekreto. Per nenio mezurebla. Varmo de la gepatraj polmoj restos en la memoro por ĉiam, kvazaŭ ili vivigus la oblaton. En miaj infanaj rememoroj, miksitaj kun revoj, nun jam nedisigeble, voĉis sonoriloj ĉe la sledo. Ĉevaloj enfandiĝis en neĝkovrita arbaro, ni rapidegis en la festa senbrido al misteroj ĝustaj dum tiu speciala nokto. Envolvitaj per vojaĝmantelo kaj kovriloj, sataj, kun varmo de la vigilia hejmo, ni revenadis al niaj revoj. Denove integritaj kun la vivo kaj ties esperoj. Festaj kaj samtempe homaj.

Polmoj de la gepatroj estis varmaj, similis al panbuloj igitaj el la forno. Estis en ili vivo. La rompita oblato aldonadis al ni kuraĝon por kuraĝe eniri en la vivon. Post fenestroj etendis la vintra pejzaĝo tiel bone konata, kaj nun en misteron de la betleĥema nokto enskribita, kondukis nin tra vojoj de la fido.

Kiel troviĝi sur vojoj de la vigilia migrado? Pli kaj pli multe sur ĝi starigitaj tombaj kandeloj kaj en la memoro interprete pro alvokado de tiuj, kiuj foriris de tiu mondo. Kaj kiam ni kantas komune kantikojn kaj pastoralojn – tiam bonveteras super nia domo, la plikita ĉielo. Sufiĉas trovi unu etan steleton kaj estos ĝi tiu, kiu kondukis en direkton de Betleĥemo. Tra la plej kurta kaj plej certa vojo.

Surskrib-libro kvina, Bialistoko 2008 (Zapiŝnik piąty)
tradukis Lidia Ligeza

Jacek Lubart-Krzysica

Kolęda z krakowskiego Rynku

Hej kolęda Mariacka
z krakowskiego Rynku
przybyli do niej Króle
co jedli w Wierzynku
i strażak w niej z hejnałem
gołębie w furkocie
kwiaciarki i poeci
bankierzy na złocie
a każdy kolęduje
a każdy się cieszy
bo zawitał do nas Jezus
spod Mariackiej wieży

Kantiko el la krakova Ĉefplaco

Hej Maria-kantiko
el krakova Ĉefplaco
venis al ĝi la Reĝoj
de „Wierzynek” aŭdace
kaj fajrobrigadano
kolombaj bruaj gregoj
floristinoj poetoj
kaj bankistoj riĉegaj
kaj ĉiu ege ĝojas
kantikas kun plezuro
– venis al ni Jesuo
de sub Maria-turo



Ĝojplenan, kvietan
Kristnaskon kaj multe
da sano, bono, feliĉo,
prospero kaj bonstato
en la Nova Jaro 2018
bondeziras al la anoj
kaj simpatiuoj
Krakova Societo
ESPERANTO

tradukis Lidia Ligeza

Pri kio parolas niaj sonĝoj

La unua libro pri klarigado de sonĝoj, kiun mi legis, estis sonĝolibro de Artemidor de greka Daldis. En la antikva Grekio, agis kaj gajnis monon por vivte-nado tavolo de aŭguristoj. Ĉi tio estis serioza kaj respektinda aktiveco en antikva mondo. Ni havas ekzemplon en Libro Genezis el Biblio. Por falsa klarigo omenisto pagis per sia kapo aŭ perdis sian posedaĵon kaj profesion.

Grekoj perfektigis la metodon klarigi sonĝojn laŭ la individua persono. Ĉi sama aĵo, persono aŭ situacio povis signifi tute malsamajn aferojn por diversaj homoj, kaj eĉ ion kontraŭan. Mi citas: "Estas utila, eĉ necesa, por pli bona kompreno inter la sonĝanto kaj la interpretisto, por ke li sciu, kiu homo estas la sonĝanto, kia estas lia aktiveco, de kiu familio li devenas, kian havas fortunon, ĉu li estas sana kaj kiom-aĝa li estas".

Antikvaj homoj opiniis, ke estas grava afero, kion kun la ricevita profetaĵo faros la demandanto. Mi citas: „Se la sonĝo antaŭdiras malfeliĉon, kaj la demandanto fidis al la averto, malfeliĉo estas malpli granda ol atendata, aŭ tute ne venas”. Ali-flanke, kiam la menso ne fidis al la promesoj de bona fortune, la antaŭdiro povas esti falsa, vana aŭ nur parte plenumita.

Klarigi oni devas laŭ Artemidor nur sonĝojn memoritajn entute. Popularaj egiptaj sonĝolibroj (kvazaŭ) ne plenumas sian rolon, ĉar ili ne konsideras la individuan situacion de la sonĝanto. Multaj el la priskribitaj de Artemidor omenoj havas nenian valoron nuntempe. Tamen, la metodo aplikata de li kaj de aliaj klarigantoj el tiuj tempoj, estas rekomendinda kaj uzebla eĉ en tiom malproksima tempo kiel nia. Ĝi postulas la uzon de imago kaj firma prudento. Ĝi estas malfacila kunigo.

Kiel ekzemplon mi montros la sonĝon pri naskiĝo, tio estas, kiam la sonĝanto naskiĝas mem. Mi citas: „Se la homo sonĝas, ke li eliras el la utero de la patrino, la sonĝon oni povas klarigi diversmaniere.

1. Por malriĉulo ĝi estas bona profetaĵo; ne mankos al li manĝaĵon kaj diligentan zorgon kiel al suĉinfano.
2. La escepto estas la homoj, kiuj vivtenas per la laboro de la manoj, ĉar ĵus la naskito kuŝas sen-age, volvita per vindotukoj de kapo al piedfingro. Ĝi ne povas movi manojn, kaj ĝi scias, ke iu, kiu havas bonajn manojn, faros anstataŭ ĝi la laboron.
3. Al la riĉulo ĝi estas estas la promeso, ke li ne regos en sia propra hejmo kaj li devos obei aliojn, ĉar malgrandaj infanoj dependas de aŭtoritato de plenaĝuloj kaj ne agas laŭ sia volo.
4. Por edziĝinto kun virino, kiu ne estas graveda, ĝi estas signo de edzinperdo, ĉar ĵus la naskito nek edziĝas nek konsumas edzecon.
5. Sed al la edzo de graveda virino naskiĝos filo, kiu estos tiel simila al li, kvazaŭ ĉi tiu viro venus denove al la mondo.
6. Sklavo akiros la favoron de sia sinjoro, kaj eĉ se li eraras, li akiros pardonon. Li ne estos liberigita, ĉar suĉinfanoj ne decidas pri sia sorto, eĉ se ili naskiĝas liberaj.
7. Por la sportuloj, sonĝo pri naskiĝo estas la komenco de malprosperoj, ĉar novnaskitoj ne scipovas marŝi kaj kuri, ne havas forton batali kaj ne povas teni sin sur la piedoj.
8. Por estantoj en framda lando la sonĝo profetas revenon hejmen.
9. Al la malsanulo la sonĝo profetas morton, ĉar la mortotukoj similas al vindotukoj, per kiuj oni vindas novnaskitojn. Krome, kiel infanoj kaj tiel mortintoj kuŝas plate surtere, de tio la konkludo, ke komenco kaj fino de la vivo estas similaj.
10. Al homo plananta sekretan eskapon aŭ vojaĝon eksterlanden, la unua ne povos fuĝi, kaj la dua ne forlasos la landon, ĉar malgranda infano ne povas preterpasi la obstaklojn sur la vojo kaj senĉese stumblas.
11. La sonĝo pri naskiĝo estas malbona antaŭsigno por la akuzanto, kiu komencas la proceson. Liaj argumentoj sonos en la oreloj de juĝistoj kiel infana babilado.
12. Akuzito, plendinto, kaj precipe tiu, kiu timas kondamnon, ne havas kialon por timi, ĉar al infanoj oni pardonas petolaĵojn.”

Kiel vi povas vidi, unu motivo de la sonĝo kaj dek du profetaĵojn.

Krakova Societo ESPERANTO

La programo de la renkontoj 2017 j.

12. 01. 2017 j. – La oblata-kantika renkonto. Polaj kantikoj esperantlingve

19. 01. 2017 j. – Grażyna Porada. La esperantaj lingvaj ludoj.

26. 01. 2017 j. – Lidia Ligęza. Kristnasko en la esperanta poezio

2. 02. 2017 j. – Stanisława Śliwińska. Homo aŭ Dio – fragmento el revuo „Frateco”

9. 02. 2017 j. – Alicja Sacha. Johano Paŭlo la Dua en ĉiutaga vivo (laŭ rememoroj de pastro Mieczysław Maliński)

16. 02. 2017 j. – Lidia Ligęza. La esperanta vortofarado

23. 02. 2017 j. – Grażyna Porada. La esperantaj lingvaj ludoj.

2. 03. 2017 j. – Anna Ramza. Prezento de la rakonto de Mark Twain „Nia itala gvidisto“

9. 03. 2017 j. – Lidia Ligęza. Pli raraj esperantaj gramatikaj konstruoj.

16. 03. 2017 j. – Grażyna Porada. La esperantaj lingvaj ludoj.

23. 03. 2017 j. – Alicja Sacha. Sankta Rita – patronino pri malfacilaj aferoj.

30. 03. 2017 j. – Stanisława Śliwińska. La slovakaj ŝercoj laŭ Eduard V. Tvarožek.

6. 04. 2017 j. – Grażyna Porada. La esperantaj lingvaj ludoj.

13. 04. 2017 j. – Grażyna Porada. Ekspozicio en Jagelona Biblioteko okaze de Zamenhof-jaro.

20. 04. 2017 j. – Stanisława Szostak. Belaj polaj paskaj kutimoj.

27. 04. 2017 j. – Lidia Ligęza. Pri verko de la konata nuntempa poeto el Suda Afriko Edwin de Kock.

11. 05. 2016 j. – Grażyna Porada. La esperantaj lingvaj ludoj.

18. 05. 2016 j. – Lidia Ligęza. Poezio de la elstara islanda nuntempa aŭtoro Baldur Ragnarsson.

25. 05. 2016 j. – Grażyna Porada, Anastazja Dądela. Suplementoj kiuj helpas konservi nian sanon.

5. 10. 2017 j. – La postsomera socjeta renkontiĝo.

12. 10. 2017 j. – Lidia Ligęza, Grażyna Porada. Raporto pri la laborplena libertempo.

Kunlaboro kun organizantoj de aranĝoj en Bjelovar (Kroatio) kaj Pluezeko (Norda Francio).

19. 10. 2017 j. – Grażyna Porada. La esperantaj lingvaj ludoj.

26. 10. 2017 j. – Alicja Sacha. Pri mia resaniga restado en Muszyna.

9. 11. 2017 j. – Stanisława Śliwińska. La nacia mondkonata verkisto Henryk Sienkiewicz.

16. 11. 2017 j. – Grażyna Porada. La esperantaj lingvaj ludoj

23. 11. 2017 j. – Lidia Ligęza. Witkacy – la ĉefa reprezentanto de formismo en Pollando.

30. 11. 2017 j. – Marta Michałowska. Pri kio parolas niaj songoj

7. 12. 2017 j. – Grażyna Porada. La esperantaj lingvaj ludoj.

14. 12. 2017 j. – Lidia Ligęza. Kiam oni ne uzas akuzativon.